



# aktuala

## 35-a ELDONJARO

**Esperantista Brusela Grupo**, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com. Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

Abona membriĝo nur por adresoj en Belĝujo, 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Eltiro 200 ekzempleroj.

In formoj : <http://users.belgacom.net/EBG> ; [ebg.skynetblogs.be](http://ebg.skynetblogs.be) ; [xurb.leadhoster.com](http://xurb.leadhoster.com) ; [esperanto.net](http://esperanto.net) ; [esperanto.be](http://esperanto.be); [lernu.net](http://lernu.net); [uea.org](http://uea.org); [liberfolio.org](http://liberfolio.org) ; [eo.eventeo.net](http://eo.eventeo.net) ; [sites.google.com/site/ebgaktuala](http://sites.google.com/site/ebgaktuala); [sites.google.com/site/panb2001](http://sites.google.com/site/panb2001)

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

## ENHAVO

- Paĝo 2 - Kotiz-tabelo 2011
- Paĝo 4 - Eksa Prezidanto Fighiera en la Kataluna 18a E-semajno
- Paĝo 6 - Nia Ponto - Revuo de Bilbao
- Paĝo 9 - Proverbaro de Rob Keetlaer en proverbaro.net
- Paĝo 10 - Esperanto Estonte de Sylla Magalhães Chaves
- Paĝo 11 - Poemaro de García, Bronštejn kaj Hernández
- Paĝo 12 - Araban noveleton tradukita de Jacob Hasbun
- Paĝo 13 - Elstara esperantisto Işmael Gomes Braga

## PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

### Oktobro 2010

- 6 Marcel Delforge pri vojaĝo trans Siberio (prokrastita *sine die* pro malsaniĝo)
- 13 Semajna kunveno sen temo
- 20 Diemante Aniĉiene pri Historio de Litovujo
- 27 Marc Demonty pri signifo de niaj sonĝoj (prokrastita de la 28/9 pro manifestacia trafikproblemo)

### Novembro 2010

- 03 Eric Baert pri liaj spertoj loĝante en Irako
- 10 **Ĝenerala jarkunveno de Esperantista Brusela Grupo** (vidu paĝo 3)
- 17 Michèle Viliers kaj Hubert de Meyere el Bouffouls pri Historio de Belĝujo
- 24 Barbara Poterucha pri nia sano

### Decembro 2010

- 01 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci
- 08 Angelos Tsirimokos pri kalendaro
- 15 Grupanoj laŭvole kunportu trinkaĵetojn, manĝetojn, ŝercetojn pro Zamenhofa Tago
- 22 kaj 29 Grupo ne kunvenas pro kristnaskaj kaj novjaraj ferioj

## KOTIZ-TABELO 2011

Nro	Kodo	Kategorio kaj Kotizo	€	Rajtoj
<b>ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO</b>				
11	MEM	Membro de EBG	10	Abono al "Aktuala" (organo de EBG)
12	MEM-R	Membro-junulo (ĝis 26-jara)	5	+ partopreno en la vivo de la Grupo
13	MEM-S	Membro-pensiulo, senlaborulo	7	Partopreno en la vivo de la Grupo
14	FAK	Familia kunloĝanto	2	Partopreno en la vivo de la Grupo
18	DVM	Dumviva membro de EBG	250	Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo ( 25 X MEM kotizo )
<b>BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ</b>				
21	APE	"Association pour l'espéranto"	14	Membro+Abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)
22	FEL	Flandra Esperanto-Ligo (FEL)	25	Membro+Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva)
<b>UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO</b>				
31	SA	Abonanto de "Esperanto"	38	Abono al "Esperanto", monata organo de UEA
32	Kto	Abonanto de "Kontakto"	23	Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA
33	MJ	Membro kun "Jarlibro"	25	Membreco en UEA + "Jarlibro"
34	MA	Membro-abonanto de UEA	61	MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato !
35	MG	Membro kun "Gvidlibro"	10	Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj)
36	SZ	Membro de Societo Zamenhof	122	Honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEA
37	MD	Dumviva Membro de UEA	1525	MA de UEA dum la tuta vivo! ( 25 X MA kotizo )

**Kara membro de EBG por ricevi Aktualan bonvolu pagi tuj 10€ abonkotizon 2011 al kasisto.**

## ZAMENHOF-FESTO EN CHARLEROI - MARCINELLE

Ĝi okazos **mardon la 14an** de decembro 2010 en «Centre du 3ème Age Mascaux», 124 rue des Champs, Marcinelle (Villette - Belle Vue). Alveno ekde 9-a horo kun bona kafo en nia esperanto-lernejo. Poste bonvenigaj vortoj far Regionaj Aktivuloj. Disdono de atestiloj al la E- lernantoj. Klarigoj pri la movado en niaj regionoj. Komuna manĝeto de panbulkoj, torto; trinkaĵoj (inkluzive). Komuna foto de la grupo. Ĉirkaŭ la 12H30 veturado aŭte al la «Château du Fosteau», rue du Marquis Leers-et-Fosteau (oni traveturos

Lobbes direkto Beaumont, +/- 20 km). Vizitado de la kastelo kaj vizito de la meblitaj salonoj kun memorĉambro de franca Generalo Reille, oficiro de la Napoleona "Granda Armeo". Honorvino en la Kastelo kun panbulko (en la Forĝejo de la Kastelo).

Aliĝo : 20,00 eŭrojn pagendajn al kasisto de APE, S-ro Max Lechien (inkluzivas enirprezon kaj honorvinon) BE72 0003 2585 3716 (BIC : BPOTBEB1)

Informoj:  
Jean-Pol Sparenberg 071/591542  
Mireille Marnette 071/324733  
Marcel Delforge 071/431413 (poŝtelefono 0491/546987)  
Bonvolu esti bonvenaj !!!

Marcel Delforge, Marcinelle, Charleroi

## ĜENERALA JARKUNVENO

La laŭstatuta ĝenerala jarkunveno de nia Grupo okazos **merkredon, la 10an de novembro 2010** en nia kutima kunvenejo de strato VanMaerlant 2 (Ĝi estas konstruaĵo de E.U., do ne forgesu vian legitimilon!)

### Tagordo:

1. Bonvenigo, konstato de kvorumo.
  2. Aprobo de pasintjara protokolo.
  3. Raporto pri la pasintjara agado kaj nuna stato de la Grupo:  
= financa, fare de la kasisto.  
= morala, fare de la prezidanto.
  4. Aprobo de la kontoj kaj malŝarĝo de la nuna estraro.
  5. Sinprezento de la kandidatoj por la estraraj postenoj.
  6. Elekto de nova estraro.
  7. Planoj kaj proponoj por la jam komenciĝinta lernojar.
- Efektivaj membroj (kiuj, konforme al la Statuto, konsistigas la ĝeneralan membrkunvenon), estas **insiste** - kaj estraranoj **tre insiste** - petataj ĉeesti.
- Kompreneble, ĉiuj kotizpagantaj membroj estas bonvenaj, kvankam sen voĉdonrajto. **Angelos Tsirimokos**

### OSTENDA ZAMENOF-FESTO

La daton de la Zamenhof-festo en Esperanto Klubo «La Konko» en Ostendo, ni ŝanĝis al **dimanĉe 5an** de Decembro, ĉar en Kelmis ĝi ankaŭ okazos la 12an kaj kelkaj de ĉe ni volas partopreni la feston en Kelmis. Korajn Salutojn, **Marc Cuffez**

### TIENENA ZAMENOF-FESTO

Zamenhof-festo okazos en Esperanto Klubo "La Hirundo" de Tienen (france Tirlemont), apud Bruselo, **vendrede 10an** de

Decembro de la 19a ĝis la 22a horo en "De Gebowen van de Jeugdienst" 10 Donystraat, Tienen. Informas kaj aliĝigas Bert Boon, 016 815 246 gsm 0472 734 830 bert.boon(ĉe)skynet.be. **Infoblad**

### BRAZILANO ROGENER PAVINSKI

Rogener Pavinski sekvas Paŭlon Moĵajev kiel redaktoro de la revuo Kontakto. La Estraro de UEA konfirmis la decidon de la Estraro de TEJO, kiu elektis Pavinski post publika konkurso inter pli ol 20 kandidatoj. La juna brazilano aktivis diverskampe de pluraj jaroj. Kiel filmisto li estis kunkreinto de la filmo "Esperanto estas...". Kiel muzikisto li estis interalie voĉo de la grupo Supernova, kiu precipe famiĝis per siaj prezentadoj en la pasintjaraj UK kaj IJK. De 2004 ĝis 2006 li redaktis la bultenon Momenton! de Brazila Esperantista Junulara Organizo kaj de 2007 ĝis 2009 li estis estrarano de TEJO. Rogener Pavinski estis elektita kiel redaktoro por du jaroj. La unua Kontakto sub lia redakto estos n-ro 5 de la nuna jaro. "Mi multe dankas la konfidon, kiun la TEJO-estraro havas je miaj kapabloj", li diris post sia elekto. "Mi strebos doni novan vivon al la revuo kaj labori, por ke ĝi estu pli alloga, kultura kaj freŝtema. Mi planas multajn novaĵojn kaj invitas la esperantistojn partopreni en la kreado de la nova Kontakto". La revuon Kontakto ricevas ĉiu individua membro de TEJO. Ekde 2011 ĝi enhavos ankaŭ la bultenon TEJO tutmonde, kiu ĉesos aperi kiel aparta eldonaĵo.

**Gazetaraj Komunikoj de UEA**

## KATALUNA 18A E-SEMAJNO

La 18-a Internacia E-Semajno de la Kulturo kaj Turismo okazis de 2a ĝis 9a oktobro 2010 en Hotelo Natura Park\*\*\*, Coma-Ruga, municipo El Vendrell, Tarragona, Hispanio.



Kuna foto de 12 belgoj inter 140 partoprenantoj

La historio de Coma-Ruga estas simila al tiuj urboj de la mediteranea marbordo. Antaŭ sesdek jaroj ĝi estis simpla apudmara vilaĝo, kies loĝantoj estis fiŝkaptistoj aŭ sin dediĉis al la agrokulturo. Je la mezo de la pasinta jarcento, la vivo en tiu urbeto komplete ŝanĝiĝis, alvenis la turismo kaj ĉio transformiĝis kaj kie troviĝis dometoj aŭ kabanoj por la fiŝkaptistoj, kaj grundoj de la agrikulturistoj apud la maro, nune estas majestaj hoteloj. Pri la historio de Coma-Ruga, ĉiam ligita al tiu de El Vendrell, oni havas la unuajn vivosignojn bone dokumentitaj ekde la jaro 1180, kaj kiel posedaĵo de la Monaĥejo de Sant Cugat. Tiutempe la povo de la religiaj organizaĵoj katolikaj estis grandega kaj ili posedis terenojn, vilaĝojn, kies loĝantaro dependis de ili. Tiu de Vendrell apartenis al Monaĥejo de Sant Cugat, kiu situas inter Barcelono kaj Sabadell. La nomon Coma-Ruga oni povas traduki, kiel monteton kiu havas

malgrandajn terenaltaĵojn aŭ prominencoj. La urbeto havas sian strandon apud la hotelo de la kongreso kun velŝipa haveneto kaj la beleco de la blua Mediteranea Maro.

**Kaptita el TTT-ejo**



Fighiera prelegas apud Corsetti kaj organizantoj

### FIGHIERA EN COMA-RUGA

Giancarlo Fighiera, nia eksa prezidanto de Esperantista Brusela Grupo, estis la ĉefa preleganto de la 18-a Internacia E-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Coma-Ruga. Li enmanigis la premion 2010 Ada Fighiera Sikorska (nomo de lia amata forpasita edzino) al profesorino Rafaela Urueña de Valladolid. Nia eksa prezidanto Fighiera rememoris kun ĝojo kaj plurfoje menciis lia loĝado de 17 jaroj en Bruselo kaj 11 jaroj en Madrido kun lia edzino Ada Fighiera Sikorska, redaktorino de "Heroldo de Esperanto". Post lia emeretiĝo de organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj nomata Turisma Monda Organizo, ili retranslokiĝis al lia naskiĝurbo Torino, unua ĉefurbo de unuiĝinta Italujo kaj loko de la venonta Itala Kongreso de Esperanto 2011. Aliaj du tre aprecate famaj prelegantoj estis Renato Corsetti kaj Anna

Löwenstein. Stano Marček gvidis ĉiutagajn kursojn laŭ lia rekta metodo. Koreana paro An JongSoo kaj Ko KyunJa (esperante Kara An kaj Roza K) prelegis pri korea kulturo kaj pacista movado kun prezento de koreaj kantoj kaj dancoj kun ventumilo.



Redaktoro kun la korea paro

Michèle Viliers kaj Hubert De Meyere el Bouffouls Karloredo prezentis tre interesan prelegon kaj pps-prezentado (power-point) pri la historio de Belgujo kiu, laŭ nia demando, devos esti ripetata dum iu merkreda kunveno de EBG.



Paro Michèle Viliers kaj Hubert De Meyere

Ankaŭ prelegoj de António Marco Botella el Zaragoza pri centjara datreveno de poeto Miguel Hernandez

kaj de Wolfgang Gunther pri defendo de naturo kaj de vivkondiĉoj.



Fighiera prelegante kaj kun la redaktoro

Operaio "La Bohema Vivo", koncerto de piano, folkloro havanera muziko kun la tradicia ensemble "Montjuic", laŭvolaj dancoj kaj baloj, vesperoj interkonaj kun ĉampano kaj "Kremat" bruligita rumo kun grenoj de kafo kaj aliaj speciaĵoj. Ekskursoj al Monserrat, vinkeloj, El Vendrell kaj apuda plaĝo San Salvador kun vizito de la muzeo dediĉita al violonĉelisto Pau Casals. Vizito ekstraprograme al la apuda mirinda vilaĝo "El Roc de Sant Gaetan" estis farita de multaj partoprenantoj. La urbestro de El Vendrell inaŭguris persone kune kun la partoprenantoj en la aranĝo, ŝtona memorplako sur la muro de la urbodomo. Dek du belgoj estis de la 140 partoprenantoj, nome Guido Blondeel kaj Gwendoline Leclercq el Aalst, Cecile Deprez kaj Sinnaeve Omer el Bredene, Liliane Ketelers el Oostende, Thérèse Dequitt el Baisieux en la ŝtatlimbordo kun Francujo, Michèle Viliers kaj Hubert De Meyere el Bouffouls, Diemante kaj Paulo Branco el Bruselo, Agnès Geelen el Deurne, Omer van Hulle el De Panne.

Paulo Branco, Bruselo

6

## NIA PONTO REVUO DE BILBAO



Bilbaoanoj partoprenintaj la 69-an Hispanan Kongreson, okazinta en "Santiago de Compostela", pozas ĉe la mondfama placo de la "Obradoiro". De maldekstre dekstren, ili estas: Eduardo Larrouy López, Iciar Arteche, José Luis Bringas, Jesús Miguel García Iturrioz kaj Marta Gracián.



Sur la foto, niaj kvin bilbaoaj samgrupanoj ripozas dum la Hispana Kongreso. Krom ĝui tiun belegan urbon, eblis partopreni tre allogajn ekskursojn, gustumi la tipan galegan "Queimada", lerni pri la urbo kaj pri la galega kulturo. Bedaŭrinde, nur unu estrarano de Hispana Esperanto Federacio ĉeestis, kio iom lamigis la ĝeneralan asembleon kaj, ĝenerale, la diversajn programerojn.

## EŬSKA RENKONTIĜO



La 22-an de Majo sub favora vetero okazis kun ega sukceso la

neformala sed jam tradicia renkontiĝo de eŭskaj esperantistoj. Kuniĝis esperantistoj el Arabo, Lapurdo, Nafaro kaj Gipusko kaj ni bedaŭras ke fine neniu el Biskajo povis veni. Ni parolas pri ega sukceso ĉar kuniĝis ok esperantistoj el kiuj unu, Enrique Blanco, estas novulo en la movado kaj alia, Maritxu Arruti, estas veteranino. Novaj vizaĝoj kiuj donis freŝecon al la okazaĵo. Oni bierumis, promenis kaj poste bone tagmanĝis en la restoracio "Azken Muga". Interesaj babiladoj kaj projektoj estis disvolvigitaj kaj oni planas jam la venontan Aŭtunan Renkontiĝon.

Nikolas Xil Carvalho raportis kaj sendis foton  
**UEA REVIS 5.000 MEMBROJN**

Hodiaŭ UEA havas 4999 individuajn membrojn. Laŭbezone mi mem pagos morgaŭ vespere ies kotizon por eviti, ke unuafoje mi devus registri en junio membronombro, kies unua cifero estus 4. Estus tamen bele havi almenaŭ iomete pli ol 5000 membrojn. Ĉu iuj komitatoj povus helpi tiucele? Ĉu ekzemple tiuj kvin komitatoj, kiuj mem ankoraŭ ne kotizis por 2010, pretas remembriĝi? Osmo Buller, 29/06/2010

## BILBAOANOJ EN UK



Kvar bilbaoanoj, Iciar Arteche, Marije Arteche, Marta Gracián kaj Jesús Miguel García Iturrioz,

veturis al Havano, Kubo, por turismi kaj, samtempe, partopreni la Universalan Kongreson tie okazinta. Estis neforgesebla vojaĝo, dum kiu ili kaptis la okazon veturi tra la tuta insulo kaj kontakti kun la afabla kaj simpatia loĝantaro. En la foto Iciar Arteché kaj Jesús Miguel García Iturrioz en la kongresejo de Havano.

### KURSFINA FESTO



La 11-an de junio ni organizis kursfinan feston por omaĝi al la gelernantoj, kiuj plensukcese finis la elementan kurson. Sur la foto, la ĉeestantoj pozas ĉirkaŭ tablo, dum vigle parolis kaj faris planojn por la somerferiado kaj por la venonta lernoĵaro: ni esperas okazigi novajn kursojn, unu elementan kaj alian progresigan. Ĉiu gelernanto ricevis memoraĵon pri la ĵus fininta kurso, nome, kelkajn E-librojn por kuraĝigi ilin daŭrigi la lernadon.

Artikoloj aperigitaj en "Nia Ponto", Bilbao  
Redaktoro Jesús Miguel García Iturrioz  
Secretario de la Grupo E. de Bilbao



Maldekstre dekstren kun la redaktoro, tri Bilbaoanoj en Comarruga 4-10-2010, la prezidanto José Luis Bringas, Teodoro Ibañez Martín kaj la poeto Alberto García Orive.

### FOTOJ DE LA IJK EN KUBO



Fotis & sendis Inge Simon, Aarlen, Ŝvabujo

### FAJRO EN BONA ESPERO



Foto: Bona Espero

Ampleksa incendio detruis grandan parton de la teritorio de Bona Espero, esperantista orfejo en Brazilo. La granda grundofajro trafis la regionon en la tria semajno de septembro, sed ne atingis la ĉefajn konstruaĵojn de Bona Espero.

En letero sendita al subtenantoj de la projekto, la esperantistaj estroj de la orfejo, Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, rakontas pri la okazaĵo:

*Ni saviĝis el grandega fajro, kiu alvenis fortege nokte de la nordo. Se estus dumtage, oni pli sekure povus batali kontraŭ la flamoj, sed nokte ĉiuj bestoj, ĉefe la serpentoj fuĝas de la fajro rekte al la homoj, kiuj volas kontraŭbatali... Tamen ni sukcesis defendi niajn domojn kaj legomejojn. Ĉe la lago ĉio estas nigra, kaj eĉ brulis la elektra drato kaj iom da tuboj.*

Dum la nokto la laborantoj kune kun la infanoj provis haltigi la fajron ĉe vojo, por savi la konstruaĵojn:

*Feliĉe ni sukcesis. Sed 90% de la tuta teritorio de Bona Espero, inkluzive de ĉiuj najbaraj grundoj brulis, kaj la fajro ĝis nun ne haltis. Ĝi nun devoras la parkon, kiun oni provas defendi per du malgrandaj aviadiloj, sed ne sukcesas. Ĉio brulas.*

La prezidanto de UEA, Probal Dasgupta, en mesaĝo sendita al la retroŝta listo de UEA-membroj alvokis ĉiujn laŭeble doni financan subtenon al Bona Espero, por ripari la damaĝojn.

Szilvási László, redaktoro @eventoj.hu

### ŜTONEPOKAJ OPERACIOJ

La restaĵoj de juna viro, kiuj estis malkovritaj en malnova tomo en Buthiers-Boulancourt, Francujo igis arheologojn revizii ŝian evoluteorion pri la homo en la Ŝtona Epoko. La kaŭzo estas, ke tiuj ĉi restaĵoj el la Neolitiko, datitaj je la aĝo de ĉirkaŭ 7000 jaroj, liveras pruvmaterialon por operacia interveno. Tio suponigas, ke niaj prauloj el la Ŝtona Epoko estis multe pli progresintaj en medicino, ol ni pensis ĝis nun. La arheologoj Cécile Buquet-Marcon kaj Annick Samzun kaj juĝa medicinisto Philippe Charlier konstatis, ke la maldekstra antaŭbrako de la viro estis operacie amputita, kaj ke la vundo estis purigita en sterilaj cirkonstancoj. La restaĵoj de la viro montris, ke li supervivis la operacion, kvankam li restis suferanta pro osteoartrito. Evidente la ŝtonepokanoj ne estis tiel primitivaj, ol ni kutimas pensi.

Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel  
pieter-jan.doumen@telenet.be - La Ponto N°15

## PROVERBOJ KAJ DIRAĴOJ KUN VORTO "AMO"

**Amo** estas forta, sed mono pli forta  
**Amo** faras ion, mono ĉion  
**Amo** kaj ĵaluzo estas gefratoj  
**Amo** kaj puno loĝas komune  
**Amo** pli kora, disiĝo pli dolora  
**Amo** supermezura ne estas plezura  
**Amu** Antonon, sed gardu vian monon  
**Amu** domon novan kaj amikon malnovan  
**Amu** edzinon plej kore, sed tenu ŝin bonmore  
Dentoj mordas la langon, tamen ambaŭ sin **amas**  
Eĉ monstron admiras, kiu **ame** deliras  
Eĉ por pomo putranta troviĝas **amanto**  
Edziĝo pro **amo** flamanta al la sako sonanta  
En ĉeesto **amata**, en forest' insultata  
**Geamantoj** sin pikas  
Kiam sako mizeras, **amo** malaperas  
Kiu **amas** ĝuon, **amu** ankaŭ enuon  
Kiu **amas** honoron, **amu** laboron  
Kiu **amas** la liton, ne akiros profiton  
Kiu **amas** okulaĉi, ne havas kion maĉi  
Kiun vesto ornamas, tiun homoj ek**amas**  
Mal**amanto** de faro estas **amanto** de kalendaro  
Mono **amas** kalkulon  
Morgaŭ estas la **amata** tago de mallaboruloj  
Ne bela estas **amata**, sed **amata** estas bela

9  
Ni **amu** nin frate, sed ni kalkulu akurate  
Perforta **amo** estas plej forta mal**amo**  
Por paro **amanta** ĉiu loketo sufiĉas  
Pro **amo** al la kandelo kato lekas la kandelington  
Sanktfigurojn ornamas kaj homojn mal**amas**  
Se **amas** Dio, prosperas ĉio  
Se la gasto estas **amata**, eĉ lia servanto ne restas malsata  
Se oni **amas** la gaston, oni zorgas la paston  
Tio estas lia **amata** ĉevaleto  
Tuso kaj **amo** ne estas kaŝeblaj  
Venis mizero — helpu min, frato; pasis mizero — for, mal**amato**  
Vi **amas** preni, amu redoni



Rob Keetlaer en proverbaro.net

10

## ESPERANTO ESTONTE

Ĉu Esperanto estas fakte bona lingvo por la tria jarmilo? Laŭ la idealoj de Zamenhof certe jes. Laŭ la uzado kaj agado de esperantistoj, foje jes, foje ne. Ĝia taŭgeco dependas de pluraj kvalitoj. Kaj tiuj kvalitoj pli dependas de tio, kion ni faras por ĝi kaj per ĝi ol de tio, kion ni pensas kaj diras. Esperantistoj diras, ke ĝi estas neŭtrala, klara, simpla, riĉa, fleksebla, belsona, alportas avantaĝojn kaj interfratigas homojn. Ĉu tio estas la vero, aŭ nur tio, kio ni dezirus, ke estu la vero? Ni analizu tiujn kvalitojn, unu post alia.

**Avantaĝa** – Certe ĝi ne estas, se oni konsideras financajn avantaĝojn. Grandaj naciaj lingvoj permesas legi pli da libroj, kontakti pli da homoj kaj havi pli bonajn dungojn. Esperanto alportas precipe moralajn avantaĝojn, kaj nur malofte praktikajn.

**Neŭtrala** – Certe jes, kiel preskaŭ ĉiuj planlingvoj, multaj klasikaj lingvoj, gestolingvo, signobildoj ktp. Evidente tiun kvaliton ne havas la grandaj naciaj lingvoj, kiuj intime rilatas la kulturon de difinitaj popoloj.

**Klara kaj Belsona** – Jes, sed ne nur Esperanto. Tio estas kvalito de diversaj naciaj lingvoj, kiel la itala kaj la rusa, kaj dependas de la persono, kiu parolas iun ajn lingvon. Kaj bedaŭrinde ne ĉiuj esperantistoj kapablas aŭ lernas paroli klare kaj belsone.

**Ĝi interfratigas homojn** – En la idealoj de Zamenhof, jes. En la nuna Esperantio, parte jes, sed ofte ne. Unu el la plej trafaj kontraŭpropagandoj por esperanto okazas, kiam esperantistoj, en amaskomunikiloj aŭ retpoŝte, pravas, ke ili ne kapablas ami unu la alian eĉ en la “lingvo de amo”.

**Simpla, Fleksebla, Riĉa** – Laŭ la planoj de Zamenhof, jes. Laŭ la nuntempa uzado kaj instruado, tre malofte. Mi tre bedaŭras, ke pluraj instruistoj intence kaŝas la flekseblecon de Esperanto, celante montri simplecon dum la “periodo de amindumo” (komenca ŝajnigo, ke Esperanto estas multe pli simila al la lingvo de la lernanto ol ĝi fakte estas). Nome de ilia celata simpleco, ili prokrastas la instruon de la **Fleksebleco**, kiun Esperanto havas danke al siaj afiksoj kaj reguloj pri kunmetado. Tion Claude Piron kritikis en Francio kaj mi kritikis en Brazilo. En la kontraŭa direkto, mi ankaŭ bedaŭras, ke kelkaj verkistoj kun plezuro uzas aŭ eĉ kreas nenecesajn vortojn, kiuj igas iliajn tekstojn tre malfacilaj por novuloj. Tiuj du grupoj kreas preskaŭ netransponeblan baron inter Esperantaj lernaĵoj kaj legotaĵoj. Du lernindaj vortoj, kiuj montras, ke Esperanto estas samtempe riĉa kaj simpla, estas **Ci** kaj **Moŝto**. Ambaŭ estas fundamentaj kaj meritas esti sufiĉe frue lernataj. Ili prezentas plian pruvon, ke malgraŭ sia simpleco Esperanto povas transdoni ĉiujn nuancojn de la naciaj lingvoj, kaj tial estas multe pli ol simpla kodo.

Sylla Magalhães Chaves (02-06-1929/30-05-2009)  
El prelego de 07.06.2007, KKE, Rio, Brazilo

## HAJKOJ SUR POEMO

Jen poemo de Miguel Hernández (1910-1942) el Orihuela, okaze de la centa reveno de lia naskiĝdato, poeto de la hispana tiel nomata "generacio de 27", kiu venis el la kamparana medio, kaj mortis pro tuberkulozo en prizono de Alikanto, kie li estis enkarcerigita de la reĝimo de ĝeneralo Francisco Franco.

Li alvenis kun tri vundoj:  
tiu de la amo,  
tiu de la morto,  
tiu de la vivo.

Kun tri vundoj li venas:  
tiu de la vivo,  
tiu de la amo,  
tiu de la morto.

Kun tri vundoj ja mi:  
tiu de la vivo,  
tiu de la morto,  
tiu de la amo.

## INSPIRITAJ DE LA POEMO TRI HAJKOJ

Plenscena jeno  
el akvo & aero -  
vekrias vivo ...

Senĝena ĝemo  
je veno & vundo -  
drumtrenas morto ...

Memema geno  
inter kisoj & ungoj -  
brullezas amo ...

Nula Horo, prezentis António Marco Botella

11

## SONETO

En la ombra-silenta saloneto  
kie mi troviĝas, via memoro  
alvenas konstante al mia koro,  
**Regina**, per versaĵoj de soneto.

Mia konscio estas kiel breto  
kie mi gardas kun fervoro,  
en skatoloj da ĝuo kaj angoro,  
miajn romantiksonĝoj de poeto.

Kiam miaj palpebroj al senluma  
nokto enfalas, sonĝa-iluzio  
en mia koro vekigās; per suna

imago, kiel reala vizio,  
vi venas al mi en la nokto bruna  
inter l' skatoloj de sonĝpoezio.

Alberto Garcia Orive, Bilbao, Hispanujo



Alberto kun Regina en Coma-Ruga, 4-10-2010

## KLARIGO

Tro daŭras etende sensenca diskuto...  
Kun vea singulto post pena misgluto  
Klarigas mi, eble tro emocie,  
Al ulo malsimpatia,  
Ke lia libero finiĝas tie,  
Kie ekas la mia.

Miša Bronštejn, Junio 2008

12

## NOVELETO 19 (7a-13a jarcentoj)

...  
Vivis en nia urbo virta  
maljunulino, pia kaj fast-inklina. Ŝi  
havis filon, bilmakleriston,  
fordonantan sin al drinkado kaj al  
ludado. Li okupadis sin en sia  
butiko la plej grandan parton de sia  
tago. Vespere reĥejmeniĝadis,  
konfidadis sian monujon al sia  
patrino, kaj eliradis tranokti en  
drinkejoj. Certa ŝtelisto, rimarkinte  
lian monsaketon ekcelis kapti ĝin  
de li. Iam vespere li sekvis lin kaj  
enŝteliĝis en lian domon malantaŭ  
li kaj tie kaŝiĝis, dum la homo  
konfidis la monsaketon al sia  
patrino, antaŭ ol reeliri. Ŝi havis en  
sia domo ĉambron preskaŭ tute  
ĉirkaŭkraditan kaj provizitan per  
fera pordo, kie ŝi metadis siajn  
vestaĵojn kaj ĉiujn posedaĵojn  
siajn, kaj la monsaketon. Ŝi do  
kaŝis ĝin tie tiun vesperon,  
malantaŭ la pordo, kaj sidiĝis  
vespermanĝi antaŭ la ĉambro. La  
ŝtelisto diris al si mem: "Nun ŝi  
manĝas; post ŝi duondormos kaj  
fine funde endormiĝos; tiam, mi  
malsupreniros, malfermos la  
pordon kaj prenos la monujon kaj  
la vestaĵojn. »

Kiam ŝi finis manĝi, ŝi komencis  
sian preĝon. La ŝtelisto konjektis,  
ke ŝi faros sian vesperan preĝon  
kaj endormiĝos. Li atendis. Ŝi  
plilongigis sian preĝon, kaj la afero  
senhontece daŭris ĝis meznokto.  
La ŝtelisto venis en embarason pro  
kio estas okazanta al li, kaj timis,  
ke la mateno reatingu lin sen ke li  
estu akirinta ajnon. Li cirkulis en la

domo kaj trovis tutnovan izaron.  
Izaron estas senmanika vesto  
portata de orientaj virinoj sur la  
aliaj vestaĵoj. Li serĉis braĝon kaj  
ĝin trovis. Li trafis specon de  
incenso bonodora. Surmetinte la  
izaron kaj ekbruliginte la incenson,  
li komencis malsupreniri la  
ŝtuparon, kriegante per stentora  
voĉo por intence timigi la  
maljunulinon. Ŝi estas mu'tazila  
[apartenanta al religia movado  
raciisma kaj dogma] kaj eltenema.  
Ŝi travidis lian ruzaĵon, kaj  
komprenis, ke li estas ŝtelisto. Sed  
ŝi ne lasis lin ekscii, ke ŝi jam  
kaptis la sencon de lia trompa ago.  
Ŝi diris, kvazaŭ tremante el  
timego: « Kiu troviĝas tie? » Li  
respondis al ŝi: « Mi estas la  
sendito de Allaho, Mastro de la  
mondoj [laŭ korana esprimo]. Li  
sendis min al via filo, tiu  
perversulo, por ke mi donu al li  
averton kaj plenumu tion, kio estas  
necesa por malhelpi al li lian  
faradon de fiaĵoj. » Mienante  
kvazaŭ ŝi ŝanceliĝas kaj mortas de  
timo, ŝi alpaŝis al li kaj diris:  
« Ho, Gabrielo, mi petas al vi por  
Allaho nur tion, ke vi favoru lin,  
ĉar li estas mia ununura filo! » La  
ŝtelisto respondis: « Mi ne estis  
sendita por lin mortigi! » Kaj ŝi al  
li: « Kion vi volas? Por kio vi  
estis sendita? » Li: « Por forpreni  
lian monsakon kaj regali lian koron  
per tio; se li faros penton, mi  
redonos ĝin al li. » Ŝi: « Tio estas  
ja via afero, ho Gabrielo, kaj tio,  
kion oni al vi ordonis. » Li diris:  
« Malproksimiĝu de la pordo de la

**ELSTARA ESPERANTISTO  
IŜMAEL GOMES BRAGA**

*Tuta vivo dediĉita al du idealoj*

ĉambro! » Ŝi malproksimiĝis. Tiam, li malfermis la pordon kaj eniris la ĉambron por kapti la monsakon kaj ŝiajn posedaĵojn. Dum li enbuligadis ilin, ŝi revenis iom post iom, tiris la pordon kaj refermis ĝin energie; poste, ŝi kroĉis ringon al la fermilo, prenis pendseruron kaj riglis ĝin. La ŝtelisto ekvidis subokule la morton. Li deziris trovi, interne de la ĉambro, tujan rimedon, kiel lukon aŭ truon, sed sensukcese. Li tiam diris al ŝi: « Malfermu la pordon por ke mi eliru! Via filo ĵus pentis. » Ŝi repondis: « Ho, Gabrielo, mi timas perdi mian vidadon, se mi malfermus la pordon, ekrigardante vian lumon. »

Li: « Mi estingos mian lumon por ke vi ne perdu vian vidadon. » Ŝi: « Ho, Gabrielo, vi estas kuriero de la Sinjoro de la mondoj; ne mankas al vi la kapablo eliri trategmente, nek tiu tratruo la muron per plumo de via flugilo por eliri; do, ne trudu al mia vidado elprovon de blindumeco ». Tiam la ŝtelisto, kompreninte, ke ŝi estas ferma, ŝvelparole pentis kaj karese ekprovis superruzi ŝin. Ŝi diris al li: « Rezignu tion! Nenia elireblo por vi antaŭ tagiĝo ». Kaj reprenis sian preĝadon. Li tiam vane admonis ŝin kaj insiste petegis al ŝi, ke ŝi liberigu lin, ĝistagiĝe. Ŝia filo rehejmeniĝis kaj ŝi rakontis al li sian aventuron. Li venigis la policestron, kiu malfermis la pordon kaj arestis la ŝteliston.

*At-Tanuĥijo, Frandaj delikataĵoj de la konversacio.  
Jacob Hasbun, membro de EBG, elarabigis*

Iŝmael Gomes Braga estis unu el tiuj animoj, kies irado sur la mondo postlasas striojn el neestingebla lumo.

Lia vivo kaj lia verko staras kiel konstruaĵo de plej solida konsisto intelekta kaj morala. Kaj ne hazarde estas, ke li, ankoraŭ tre juna, inklinis al du idealoj, en kiuj intelekto kaj moralo perfekte harmonias inter si por altiri homojn al kleriĝo kaj perfektigo de siaj karakteroj; ĉar efektive Iŝmael estis homo de plej nobla karaktero, animo kiu portis en la mondon fajrerojn de progreso por lumigi la vojon al siaj kunuloj dum la vojaĝo surtera.

Iŝmael ne frekventis altlernejojn, universitatojn, gravajn centrojn por klerigado, sed liaj intelekto kaj inteligento brilis per enviindaj saĝo kaj scio-provizoj, kiujn li plej pene akiris kaj transformis en potencajn rimedojn por altiri homojn al tiuj grandaj idealoj, al kiuj li sin tute fordonis dum sia longa kaj fekunda ekzistado. Multon multaj, multfoje, skribis pri Iŝmael, kaj ĉiu, krom la ordinaraĵoj, alportis specialan rigardon pri la granda pioniro. Iŝmael naskiĝis en la 14 de Julio 1891, en loko nomita Córrego Alegre, proksima al la urbo Ubá, Ŝtato Minas Gerais. La krudaj kamplaboroj, al kiuj li, ankoraŭ infano, devis sin fordoni dum preskaŭ tuta tago, kaj la neebleco regule frekventi unuagradaĵojn lernejojn, ne sufokis ĉe Iŝmael lian neordinaran sciavidon.



Li havis nek monon por aĉeti librojn, nek sufiĉe da tempo por ilin legadi. Aĝante 14 / 15 jarojn, li dungigis kiel komizo en malgranda komercejo en Ubá, kie li deĵoris de la 6<sup>a</sup> matene ĝis la 9<sup>a</sup> vespere. Sed tiam, dank'al protekto de klera kaj bonkora parenco, li komencis trabati al si vojon al estonta poligloteco. Lia onklo Habel Gomes donacis al li lernolibron pri la franca lingvo, kiun li poste plene scipovis nur dank'al persista lernado.

Estis iu dirigento, loĝanta en Ubá, nomita Johano Ernesto, kiu unue altiris la atenton de Iŝmael al Esperanto. Tio okazis en la jaro 1907. Li poste enskribiĝis, pro instigo de tiu sama Johano Ernesto, por koresponda kurso de Brazila Esperanto-Ligo, sub la gvido de la fama pioniro Alberto Couto Fernandes. Kaj en 1910 Iŝmael aliĝis al BEL sub la numero 13. Tiel granda estis lia entuziasmo pri la nova lingvo, ke en 1914 li korespondis kun 200 samideanoj el Germanio. Lia mirinda inklino al

lingvoscio ebligis al li lerni kaj scipovi, krom la franca, la latinan, la anglan, la italan kaj la hispanan. Li ankaŭ lernis la hebrean, la araban, la rusan, la nederlandan kaj la grekan. Profesie li laboris kiel librotenisto. La kontosciencon li lernis per koresponda kurso ĉe usona lernejo, kaj post perfektigo en Komerca Instituto li ricevis diplomon. Li ankaŭ lernis stenografion ĉe nokta lernejo. Iŝmael devis ja transpasi verajn montojn por akiri brilan kleracon, atingi siajn intelektajn kaj profesiajn celojn. Kaj utilas al ni atenti rimarkojn, kiujn Iŝmael faris pri si mem, laŭ unu biografia teksto: *Se mi estus pasiginta la junaĝon en kolegio, kun bonaj instruistoj, ĉu mi estus farinta, kion mi faris? Aŭ ĉu mi estus nur fierulo kompatinde ravita de si mem?* Ĝis 1912 Iŝmael konfesis la saman religion de la gepatroj, sed sen fervoro. Li estis katoliko. Memkompreneble, pro sia konduto morale supera, li nature praktikis la principojn de Kristanismo. En tiu jaro 1912, li transloĝiĝis al urbo Teixeiras, kie li iam estis invitita ĉeesti tiel nomatan seancon de "parolanta tablo". Temas pri fenomeno tre ofta en la komenco de Spiritismo, kiu konsistis en manifestiĝo de Spiritoj pere de iu celtaŭga tableto. Por komunikado de inteligentaj mesaĝoj oni aranĝis kodon laŭ kiu ĉiu litero de la alfabeto respondis al difinita nombro de batoj. Iŝmael provis la tablon per Esperanto. Li tiam havis 5 fratojn kaj 3 fratinojn. Kaj li demandis la tablon: kiom da fratoj mi havas? La tablo batis kvinfoje.

Sed Iŝmael pensis pri siaj 8 gefratoj. Li refaris la demandon en Esperanto. Sama batrespondo venis. Li estis jam forironta, kiam li memoris pri la prefikso GE, kiu esprimas kunecon de ambaŭ seksoj. Kaj Iŝmael denove demandas, uzante tiun precizigan sufikson: kiom da gefratoj mi havas? La tablo batis okfoje!... Li forte impresiĝis de la afero, priskribis ĝin en letero al tiu Johano Ernesto, kiu altiris lin al Esperanto kaj fariĝis vigla propagandisto de Spiritismo. La dirigento, en sia respondo, ankaŭ sendis al Iŝmael ekzempleron de La Libro de la Spiritoj, en la portugala. De tiam do, kaj en tiel kurioza maniero, komenciĝis la kariero de Iŝmael kiel unu el la plej fekundaj disvastigintoj de Spiritismo en Brazilo kaj en la mondo. En 1920, Iŝmael transloĝiĝis al Rio, kie, konstatinte la barojn, kiujn Esperanto renkontadis por firmiĝi sur solida grundo, li entreprenis plej viglan, plej intensan poresperantan laboron per libro-eldonado, prelegado, artikolverkado, instruado, k.a. Kaj lia agado tiel rimarkindiĝis, ke en 1933 lia nomo aperas en la Enciklopedio de Esperanto kiel motoro de senĉesa kaj senlaca disvastigado de Esperanto, ĉefe en spiritistaj rondoj. Ĝuste en 1933, laŭ informoj de la spiritista verkisto Zêus Wantuil, aŭtoro de unu el la plej bonaj, se ne la plej bona, biografio de Iŝmael, komencas aperi liaj artikoloj en la revuo *Reformador* pri Esperanto kaj Spiritismo. Li uzadis plurajn

15

pseŭdonimojn, el kiuj menciindas la tre konataj Lincóia Araucano, Antônio Túlio, Lino Teles, Cristiano Agarido, Ismar Brando. Sed 1937 estis mejloŝtona jaro en la agado de Iŝmael kiel esperantisto-spiritisto. Kun la apogo de la tiama prezidanto de la Brazila Spiritisma Federacio, D-ro Luís Olímpio Guillon Ribeiro, li entreprenis viglegan, intensan priesperantan disvastigadon, kies ĉefa trajto estis la eldonado de libroj. Kaj ĉio eblis nur tial, ke la Brazila Spiritisma Federacio, kiu jam disvastigadis Esperanton ekde la jaro 1909, metis je dispono de Iŝmael siajn potencajn rimedojn: oficistaron, eldonejon, librejon, revuon, sidejon por kursoj kaj publikaj paroladoj. Dekoj da libroj estis publikigitaj: lernolibroj, vortaroj, antologioj, artikolaroj, tradukoj de doktrinaj verkoj. Unu el la plej belaj fruktoj de tiu intensa laborado estis lia *Esperanto sem Mestre*, kies lastan, definitivon eldonon efektive kunaŭtoris du eminentaj majstroj de nia lingvo: Francisko Valdomiro Lorenz kaj Porto Carreiro Neto. Sed lia agado en la spiritistaj rondoj ankaŭ alportis bonon al la neŭtrala movado, kies fortoj elĉerpiĝadis pro kaŭzo reliefigita de Ivo Lapenna en sia bonega verko *Esperanto en Perspektivo: (...) Troa fido al registara patronado kaj manko de praktika apliko de la lingvo (...)*. En 1940, Iŝmael faris unu el siaj oftaj vizitoj al la fama brazila medio Francisco Cândido Xavier, en la urbo Pedro Leopoldo. Tie, dum seanco, la medio psikografie ricevas

16

mesaĝon adresitan de la Spirito Emmanuel al Iŝmael. Temis pri la fama teksto titolita *La Misio de Esperanto*. Tiel forta estis la influo de tiu teksto sur la spiritista movado, ke ĝi fariĝis unu el la tri kolonoj subtenantaj la poresperantan laboradon de la spiritistoj en Brazilo. La afero prenis neantaŭviditajn dimensiojn, ĉar de tiam Esperanto definitive eniris la programon de la brazila spiritista movado. En 1951, Iŝmael, kune kun malgranda aro da sindonaj, fervoraj gesamideanoj, kunfondis la Kulturen Kooperativon de Esperantistoj, kiu interalie disponigis al li neŭtralan terenon por daŭrigo de lia ĉiam vigla libroverkado kaj konsekvenca eldonagado. En 1957, pro sia senlaca, senĉesa, ĉiam brila kaj fekunda kvindekjara servado al la idealoj de Esperantismo, Iŝmael ricevis omaĝojn de la esperantistaro brazila kaj eksterlanda. Inter ili, menciindas la speciala omaĝo de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj, kiu al li dediĉis la tutan julian numeron de sia organo *Kooperativismo*. Multaj gesamideanoj verkis tekstojn, en kiuj ili esprimis sian admiron kaj dankon al la tre amata pioniro. De tiam, ankoraŭ dum 12 jaroj, li fekunde, pozitive influadis la novajn generaciojn de esperantistoj per sia aŭtoritata voĉo kaj per sia ĉiam juneca entuziasmo. Li forpasis en la 18 de januaro 1969, sed lia memoro kaj lia verko ĉiam ankoraŭ instigas, gvidas kaj subtenas amason da sinceraj batalantoj por la idealoj de Zamenhof. Antaŭ ol fini mian

senpretendan parolon, mi volas rememori miajn tre malmultajn sed riĉegajn personajn spertojn ĉe tiu eminenta homo. Mi ĉerpas tiujn lastajn vortojn en intervjuo, kiun mi donis antaŭ kelke da jaroj al Aloísio Sartorato okaze de unu el la interretaj babiladoj, kiujn Aloísio tiam reĝisoris ĉiusabate ĉi tie en la Kooperativo. *“Mi fariĝis esperantisto en maniero tute neordinara, almenaŭ ekster Brazilo: al lernado de Esperanto mi estis instigata de respektinda Spirito - Adolpho Bezerra de Menezes - tre populara, tre amata, tre elvokata en la spiritistaj rondoj en Brazilo. La instigado venis, ĉirkaŭ la fino de 1962, komence de 1963, pere de la karmemora mediumino Yvonne do Amaral Pereira, ĝuste tiu, kiu psikografie skribis la verkon “Memoraĵoj de Sinmortiginto”, kies spirita aŭtoro estas la portugala romanverkisto Camilo Castelo Branco. Mi eklernis la lingvon kun granda entuziasmo, ja plej fervore. Mi vizitadis la kursojn de KKE (Almir Ferreira, Najlo, Ruto, Braz Cosenza, Cedilja, Lazarus Brieger) kaj la kursojn de BEL (Carlos Domingues, Jorge Campos, Floriano Pessoa, Kocher, Mello e Souza, Jozefo Joels). Mi ankaŭ provis memlernadon: dum la tuta jaro 1963 mi ĉiunokte trastudadis la lecionojn de “Esperanto sem Mestre” kaj ja sukcesis finplenumi tiun kvazaŭ “faraonecan” entreprenon. En 1964, komenciĝis korespondado (daŭranta ĝis 1977) inter Yvonne Pereira kaj iu varsoviano, pri kiu ŝi poste mediume sciis, ke li estas la reenkarniĝo de Spirito, kiu komuniĝis kun ŝi ĝis la jaro 1931. Ĉar ŝiaj scioj pri*



Esperanto estis tre malsufiĉaj, ŝi petis min pri helpo. Tio estis plia helpo al mia lernado, ĉar mi devis multe legi por konatiĝi kun la bonaj stilistoj kaj tiel traduki, kiel eble plej fidinde, ŝiajn longajn, riĉenhavajn leterojn. En 1965, mi kuraĝis skribi leteron al *Iŝmael Gomes Braga* kun la celo elpeti ian longdaŭran studprogramon. Li afable respondis, liveris al mi plej profundajn instruojn. Tiun respondon, kiel cetere ĉiujn korespondaĵojn de *Iŝmael*, mi konservas kiel ĉiam aktualan programon por perfektigo. En 1966, mi transloĝiĝis al la insulo *Paquetá*, kie mi loĝis tutajn 20 jarojn. Tio estis periodo de senĉesa studado de la esperanta literaturo. Ĉiutage, dum duhora veturo en ferboato - unuhora al *Rio* kaj unuhora revene al la insulo - mi legadis, notadis, ja ensuĉadis la altvaloran materialon - tradukan kaj originalan - liveritan de *Zamenhof*, *Privat*, *Kabe*, *Baghy*, *Kalocsay*, *Auld*, *Boulton*, *Forge*, *Lapenna*, *Porto Carreiro* kaj multaj aliaj. Tiam mi provis traduki parton de "Kio estas Spiritismo", de *Kardec*, celante provi min mem. Mi sendis la tradukon al *Iŝmael*. Li afable ekzamenis, zorge korektis la materialon, diris al mi kuraĝigajn vortojn, ke mi senĉese penadu perfektigi. Mi memoras, ke mia patro tiam donacis al mi ekzempleron de "La Sankta Biblio". *Iŝmael* lernigis al mi, kiel plej profunde profiti el la legado de la Biblio, ĉefe el la teksto de la Malnova Testamento, kies tradukon ni ŝuldas al *Zamenhof* mem. En 1969, *Iŝmael* forpasis. En tiu sama jaro mi gajnis la unuan premion en traduk-konkurson iniciatitan de BEL. Tiam kortuŝis min la fakto, ke en sama numero de *Brazila Esperantisto*

(majo-aŭgusto-1969) aperis la nekrologo de nia granda pioniro kaj mia traduko. Tio estis la unua fojo, kiam mi elpaŝis publike kun unu esperanta tradukaĵo." Okaze de la festoj memorigaj pri lia senĉesa kvindekjara aktivado por Esperanto, la Kooperativo, kiel jam ĉi-supre dirite, dediĉis al li la tutan julian numero de sia organo *Kooperativismo*, en kiu aperis bela akrostiko de *Sylvio Peixoto* omaĝe al *Iŝmael*. Mi verkis ankaŭ ian akrostikon omaĝan al li, kiam la movado memorigis la centjaran datrevenon de lia naskiĝo, en 1991. Kaj ja per tiu teksto mi finas ĉi tiun mallerte aranĝitan paroladeton:

*I*nstigas vi daŭre al la laboro  
*S*urtera por la sanktega Afero  
*M*ilojn da fratoj, kiuj en la koro  
*A*spiras kun amo, ĝoj' kaj espero,  
*E* laĉeti sin el pek' kaj doloro,  
*L*uktadi por venk' de Justo kaj Vero

*G*vidu nin, kara, amata Mentoro,  
*O*ptimisme stari kontraŭ danĝero,  
*M*iliti por pac' - ĉiela trezoro -  
*E*n gaj' de l' anim', por ke la prospero  
*S*pirita de l' mond' venu por aŭro

*B*enata de l' temp' en kiu libero  
*R*estados por ĉiam, kaj en fervoro  
*A*tingu ni per mildo de l' tolero  
*G*loron revatan de l' pola doktoro:  
*A*mon, fratecon sur la tuta Tero!

Afonso Soares - Prelego en KKE  
 INKO, Rio de Janeiro, Brazilo

Informilo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj

#### Verkaj kaj periodaĵoj konsultitaj:

*Leteroj de Iŝmael Gomes Braga al la aŭtoro* - 1965/1966  
*Veterano* - Iŝmael Gomes Braga - 2<sup>a</sup> eldono - KKE - 1965  
*Esperanto en Perspektivo* - Ivo Lapenna - UEA - 1974  
*Iŝmael Gomes Braga* - Zéus Wantuil - B. Spiritisma F. - 1971  
*Brazila Esperantisto* - Brazila Esperanto-Ligo - maj/aŭg-1969  
*Kooperativismo* - Kultura Kooperativo de E. - n° de jul-57  
*Enciklopedio de Esperanto* - Hungara E.-Asocio - 1979



# Karstaj Tagoj



Sekvu sentime  
la indikilon.  
Tie eblas manĝi kaj trinki  
tipajn lokajn produktojn!

Por kiuj?  
Por tiuj kiuj ŝatas naturajn  
belecojn kaj amas kulturalan  
diversecon.

Ĉiĉeronado nur  
en Esperanto!

## Itineroj en la triesta provinco: la Karsto

**TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO**  
 Via Coroneo 15  
 34133 Trieste Italio  
 Telefono: (+39) 366 1720440;  
 339 2226936; 331 4805706

En kiu ajn momento de la jaro ni organizas, ekde 2 ĝis 5 tagoj, restadojn en Triesto kaj ties provinco, por grupoj de minimume 4 personoj ĝis 15, por familioj kun infanoj, por junuloj kaj plenkreskuloj.

Ni ofertas "turisman kompleton", inkluzivantan ĉiujn kostojn de tranaktoj, manĝoj, transportoj, enirbiletoj al muzeoj...

Petu informojn poŝte al la supra adreso, rete al [esperantotrieste@yahoo.it](mailto:esperantotrieste@yahoo.it)  
[noredv@teletu.it](mailto:noredv@teletu.it)  
[testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com)

**Esplorado de la altebenaĵo:**

- Fortikaĵo de Monrupino
- Val Rosandra
- La grotoj
- La Karsta domo
- La pravilaĵoj
- Botanika Ĝardeno "La Carsiana" ...





# Triestaj Tagoj

**La Kasteloj**

- Kastelo Sankta Justo
- Kastelo Miramare
- Kastelo en Duino
- Kastelo en Muggia



**Kion viziti?**

**Muzeojn!**

Muzeo Revoltella kaj galerio pri moderna arto;  
 Muzeo Sartorio, kolekto de artaĵoj de tiu fama mecenata familio;  
 Muzeo Morpurgo, loĝejo de Familo, el la 2<sup>a</sup> duono de 1800;  
 Teatra Muzeo "C. Schmidl"  
 Muzeo pri Orienta Arto;  
 Muzeo pri Historio k Arto  
 ... kaj multaj aliaj!

## Itineroj tra la urbo

**Itinero Arkitektura**, rigardante la triestajn palaĉojn, Neoklasikajn, Florstilajn ...

**Itinero Religia** por konatiĝi kun la diverseco reprezentata de la Preĝejoj: katolikaj, serbo-ortodoksa, greko-ortodoksa, evangelia, hebrea, protestanta ...

**Itinero Literatura**: sekvante la spurojn de James Joyce ...

Diru viajn preferojn kaj ni organizos!

**Itinero Arkitektura**, rigardante la triestajn palaĉojn, Neoklasikajn, Florstilajn ...

**Itinero Religia** por konatiĝi kun la diverseco reprezentata de la Preĝejoj: katolikaj, serbo-ortodoksa, greko-ortodoksa, evangelia, hebrea, protestanta ...

**Itinero Literatura**: sekvante la spurojn de James Joyce ...

Diru viajn preferojn kaj ni organizos!



Bildoj instruaj aŭ amuzaj pri transportoj, publikaj lokoj, spicoj, profesioj



Membro de EBG kaj tradukistino en la Konsilio de Ministroj de Eŭropa Unio